# ★ VERDA FAMILIO

Marto

1970 **2/70**

Březen

Neregula dulingva cirkulero por favorantoj de Internacia Lingvo. Eldonas: Esperantista rondeto ĉe OB Měst NV Č. Dub. Redaktas: D-ro J. Hradil, Český Dub 137/III, distrikto Liberec, ČSSR.
Nepravidelný dvojjazyčný oběžník pro příznivce mezinárodního jazyka. Vydává: Esperantský kroužek při OB Měst NV Č. Dub. Rediguje Dr J. Hradil, Český Dub 137/III, okres Liberec, ČSSR.

<u>LIBERECANO</u> – neregula cirkulero de Esperantista Klubo en Liberec – post longa tempo denove
aperis multobligita per ORMIG-sistemo (alkohola presmaniero). En la enkonduka artikolo ĝi alvokas precipe la malnovajn membrojn por efika kunlaboro kaj aliĝo al la restarigita Ĉeĥa Esperanta Asocio. La bulteno alportas ankaŭ laborplanon pro la plej proksima tempo. La klubo havas ĝemeliĝon kun Esperantista Klubo en Örebro (Svedujo) kaj atendas la viziton de la estro de sveda klubo s-ano Kurt Frisk. Nova komitato de la klubo: Prezidanto Ladislav Špína, vicprezidantoj: JUDr Jakerle + Miloň Nyč, sekretariino: Eva Kubíčková, kasistino Zdena Seidlová, komitantoj: Josef Hladík, Bohuslav Háva; membroj de revizia komisio: Štěpánka Havlenová kaj Bohumil Novotný. La klubo havas propran poŝtkeston 194, Liberec 1, ČSSR.

<u>LIBERECANO</u> – nepravidelný cirkulář Esperantského klubu v Liberci – objevil se opět po delší době rozmnožen systémem ORMIG (lihotisk). V úvodním článku vyzývá především starší členy klubu k efektivní spolupráci a přihlášce do obnoveného Českého esperantského svazu. Časopis přináší také pracovní plán pro nejbližší dobu. Klub má družbu s Esperantským klubem Örebro (Švédsko) a očekává návštěvu předsedy švédského klubu Kurta Friska. Nový výbor klubu: předseda Ladislav Špína, místopředsedové JUDr Bohuslav Jakerle + Miloň Nyč, jednatelka Eva Kubíčková, pokladní Zdena Seidlová, členové výboru Josef Hladík, Bohuslav Háva; členové revizní komise Štěpánka Havlenová a Bohumil Novotný. Klub má vlastní poštovní schránku 194, Liberec 1, ČSSR.

<u>Esperantista Klubo en Jablonec sur Nisa</u> – apartenas ĉiam en la plej viglaj kluboj en nia ŝtato. La 31-an de januaro ĝi sukcesplene aranĝis solenan vesperon okaze la tria datreveno de la klubo en sia luksa klubejo. Partoprenis ankaŭ kelkaj amikoj el la ĝemeliga klubo Jelenia Gora (Pollando). Jam dum la eniro oni povis tuj ekkoni la neperforte kreitan amikan atmosferon de la klubo. Ĉiuj klubanoj estas inter ili bone konataj – kunigis ilin la vigla agado de la klubo dum la tuta jaro. Ne gravis, kiam pro samtempa gripa epidemio ne alvenis la amuza orĥestro, tuj improvizita anstataŭa programo bone amuzis la ĉeestantojn. La alta nivelo de la klubo montriĝis precipe dum la babilado, kiam oni plejparte parolis esperantlingve.

<u>Esperantský klub v Jablonci nad Nisou</u> – vždy patří mezi nejčilejší kluby v našem státu. 31. ledna s úspěchem uspořádal slavnostní večer u příležitosti třetího výročí klubu ve své přepychové klubovně. Účastnilo se též několik přátel ze spřáteleného klubu Jelenia Gora (Polsko). Již při příchodu bylo možno hned poznat nenásilně vytvořenou přátelskou atmosféru klubu. Všichni členové klubu se mezi sebou dobře znají – stmelila je čilá činnost během celého roku. Nevadilo, že pro současnou chřipkovou epidemii nepřijel zábavný orchestr, hned improvizovaný program dobře bavil přítomné. Vysoká úroveň klubu ukázala se během přátelského popovídání, kdy se většinou mluvilo v esperantu.

La klubo preparas novajn kursojn por komencantojn kaj progresintoj, prelegon pri Danlando, renkontiĝon kun amikoj en Pollando – Jelenia Gora, partoprenon de aliaj, renkontiĝoj en Nová Paka Mělník kaj Potsdam, partoprenon je la Universala kongreso en Vieno, IV-an someran renkontiĝon de esperantistoj en Jablonec kun ekskurso al Izera-montaro kaj vizito de la Foiro en Liberec (ĉiujare ne okazos la biĵuteria ekspozicio en Jablonec). La klubo povas liveri insignojn esperantistajn (rondformajn 5 Kčs), bildkartojn („Saluton el Jablonec 1 Kčs) kaj lernolibrojn de esperanto (6 Kčs).

Nialanda revuo „AURORO“, la blindulpresa Esperantista revuo, festos ĉiujare sian 50-jaran datrevenon. Ĝia agado malfermas pordon de blinduloj por tutmondaj kontaktoj. La redaktejo ricevu nian elkoran bondizeron. (Pluaj informoj: Vuk Echtner, Díly 30, p. Postřekov, o.Domažlice, ČSSR).

En Wroclaw (Pollando) ekestis la klubo, kiu populariĝas esperantojn muzikaĵojn. Ĝi ankaŭ interŝanĝas la surbendigojn (Adreso: Klubo de kanzono, esperantista rondeto „Belsono“, Wroclaw 17, str. Dubois 3.

Esperantista rondeto ĉe la Domo de Kulturo VŽKG Vítkovice aldonis per retpreso esperantan flageton en la formato 28x11 cm, distinita por klubejoj, aŭtomobilo k s. La prezo estas 12 Kčs.

S-ano Železný, vigla kaj meritplena junularano en Praha, Košíře, Vrchlického 41/493 per sekvajn pressaĵojn:
La juna PENSO pure esperantlingva internacia gazeto aperanta en Francio, oficiala organo de SAT-junulfako, precize regule aparanta en modelforma ciklostila preso kun spiritaj desegnaĝoj ĉiu numero bele bindita – (6 numeroj jare 18 Kčs)
PACON EN VIETNAMIO, 16-paĝa kvaronjara ofsetita bulteno – 7.- Kčs jare, disendata rekte el Japanio.
KVINPINTO – sveda junulara gazeto kvaronjare 12 Kčs.
Anoncetoj EN HEROLDO Ĝis 25 vortoj 25. Kčs, ĝis 50.- vortoj 50 Kčs. La anonceto pagita por dufoja publikiĝo aperas triafoje senpage.

Klub připravuje nové kursy pro začátečníky i pokročilé, přednášku o Dánsku, setkání s přáteli v Polsku – Jelenia Gora, účast na jiných setkáních v Nové Pace, Mělníku a Potsdamu, účast na Universala Kongreso ve Vídni, čtvrté letní esperantské setkání v Jablonci s výletem do Jizerských hor a návštěvou veletrhů v Liberci (tohoto roku nebude pořádána výstava bižuterie v Jablonci). Klubu dodá eozdrav esperantské odznaky (kulaté 5 Kčs), pohledy (Pozdrav z Jablonce – 1 Kčs) a učebnice Esperanta (6 Kčs).

Naše revuo „A U R O R O“, slepeckým tiskem vydávaná revue slaví, tento rok své 50-té výročí. Její činnost otvírá brány slepců s celým světem. Redakce nechť přijme naše srdečné blahopřání. (Další informace: Vuk Echtner, Díly 30, p. Postřekov, o. Domažlice, ČSSR).

Ve Vroclavi (Polsko) vznikl klub,, který popularizuje esperantské nahrávky. (Adresa: Klubo de kanzono, esperantista rondeto „Belsono“, Wroclaw 17, str. Dubois 3.

Esperantský kroužek při domu kultury VŽKG Vítkovice vydal sítotiskem esperantskou vlaječku formátu 28x11 cm, vhodnou do kluboven, automobilu apod. Cena jest 12 Kčs.

S-ano Ivo Železný, čilý a zasloužilý mládežník z Prahy, čilý a zasloužilý mládežník z Prahy 5, Košíře, Vrchlického 41/493 zprostředkovává tyto tiskoviny:
La JUNA PENSO, esperantský mezinárodní časopis vycházející ve Francii, oficiální orgán SAT-mládeže, objevující se přesně pravidelně ve vzorové cyklostylové formě s vtipnými kresbami, každé číslo krásně svázáno (6 čísel ročně 18 Kčs)
PACON EN VIETNAMIO, ofsetový čtvrtletník 7 Kčs ročně, posílaný přímo z Japonska.
KVINPINTO – švédský mládežnický časopis čtvrtletní – ročně 12 Kčs.
INSERTY V HEROLDU – do 25 slov 25 Kčs, do 50 slov 50 Kčs. Insert předplacený pro dvojnásobné uveřejnění potřetí zdarma.

Okaze solena datreveno de J.A.Komenský (Comenius) sendis al ni s-ano Kraft el Obořiště – Příbram citaĵojn:
…Nek iu el la vivaj lingvoj, eĉ el tiuj plej kulturitaj, taŭgas; ĉar al neniu el ili manku rekomendantoj kaj ĉiu nacio fierus pro sia Helena; tial ni ne progresus sen envio, malpacoj kaj konfuzoj ….
J.A.Comenius: Panglottia, ĉap.VI, §10
… Kaj ĉar ni ankaŭ ekkonis, ke la nura, tamen tre potenca baro en la penetrado de ĉi tiu lumo (klerigo) al la nacioj estas la nombro, diverseco kaj varieco de la lingvoj, ni kuraĝis klopodi al forigo de tiu ĉi baro konsilante plibonigi kulturadon de ĉiuj lingvoj, simpligi la multlingvecon kaj fine krei novan lingvon, tute facilan kaj planitan, filozofian eĉ universale sciencan, kiel ilon de ĝenerala klerigo.
J.A.Comenius: Via lucis, ĉap. I, §9

Populare scienca presita internacia gazeto esperantlingva „HOMO kaj KOSMO" estas abonebla ĉe Libor Křivánek, Písek, Zborovská 1332.

Ĉeĥoslovaka Esperanto-Federacio fondita.

Laŭ organizaĵo de aliaj tutŝtataj asocioj ankaŭ la ĈEA kaj SEA la 20-an de decembro 1969 kunvenis en Bratislava kaj fondis Ĉeĥoslovakan Esperanto-Asocion. Prezidanto estas Jozefo Vítek (prez. de ĈEA, loĝloko Mělník), vicprezidanto Paŭlo Rosa, prez. de SEA, Bratislava), I-a sekretario Paŭlo Polnický, II- sekretario Miro Hysko, komitatanoj Drahomír Kočvara kaj Ernesto Váňa. La novelektita komitato de ĈEF pritraktis la taskojn kaj agadon 1970. Inter la plej gravajn apartenas Antaŭkongreso en Bratislava 29-31.7.1970 (en ĝia kadro okazos la I-a Kongreso de ĈEF), kaj ekskurso al la 55-a Universala Kongreso en Vieno 1.-8.an de aŭgusto 1970.

Aliaj antaŭkongresaj aranĝoj:

11.-23.VII.1970 II-a somera Esperanto-tendaro en la ripozejo Hory apud Česká Třebová nur por lingvosciantaj samideanoj, kun internacia partopreno. Gvidas s-ano Miloš Sváček, Penčice 16, o. Přerov, ČSSR, kiu jam nun akceptas aliĝilojn.
Antaŭkongresaj tagoj en Prago 22.+23,VII.1970, zorge de Eserantisto Klubo Praha, p.k.1069.
Komuna kongreso de IKUE (evangelikoj) kaj KELI (katolikoj) 24.-29.VII.1970 en Brno kun internacia partopreno okaze de 300-jara datreveno de la morto de Comenius, kun filmoj prelegoj, artaj vesperoj, junulara teatra vespero. Informos Aleš Berka, Vsetín 1423, ČSSR.

U příležitosti slavnostního výročí J.A.Komenského poslal nám citát s-ano Kraft, Obořiště – Příbram:
...Ani žádný z živých jazyků, třeba nejvypěstovanějších, se nehodí; protože žádnému z nich by nechyběli přímluvčí a každý národ by se honosil svou Helenou; proto bychom se nedostali kupředu bez závisti, sporů a nových zmatků …
J.A.Comenius: Panglottia, kap.VI, §10
...Poněvadž jsme konečně shledali, že v pronikání se světlem k národům je jedinou, ale mocnou překážkou množství, rozmanitost a změť jazyků, odvážili jsme se usilovat o odklizení těchto překážek novými radami o lepším pěstování všech jazyků, o zjednodušení mnohojazyčnosti a konečně o vytvoření jednoho úplně nového jazyka, zcela snadného a promyšleného, a filosofického, ba pansofistického jako prostředek obecného světla …
J.A.Comenius: Panglottia, kap.VI, §9

Populárně vědecký tištěný esperantský časopis „HOMO kaj KOSMO" jest předplatitelný u Libora Křivánka, Písek, Zborovského 1332.

Československá Esperantská federace založena.

Podle jiných celostátních organizací také ČES a SES schůzovali dne 20. prosince 1969 v Bratislavě a založili Československou esperantskou federaci. Předsedou jest Josef Vítek (předseda ČES, bydliště Mělník), místopředseda Pavel Rosa, předs.SEA Bratislava, 1.sekretář Pavel Polnický, 2.sekretář Miro Hysko, členové výboru Drahomír Kočvara a Arnošt Váňa. Nově zvolený výbor projednal úkoly a činnost 1970. Mezi nejdůležitější patří Předkongres v Bratislavě 29-31.7.1970 (v jeho rámci bude uspořádán první kongres Československé esp.federace) a zájezd na padesátý pátý Universala Kongreso ve Vídni 1.-8.srpna 1970.

Jiné předkongresové podniky:

11.-23.VII.1970 2.letní esperantský tábor v rekreačním středisku Hory u České Třebové jen pro jazyka znalé samideány, s mezinárodní účastí. Vedoucí s-ano Miloš Sváček, Penčice 16, o. Přerov ČSSR, který již nyní přijímá přihlášky.
Předkongresové dny v Praze 22.+23.VII.1970 péčí Esperantského klubu v Praze pošt.schr.1069.
Společný kongres IKUE (evangelíci) a KELI (katolíci) 24.-29.VII.1970 v Brně s mezinárodní účastí u příležitosti 300-letého výročí úmrtí J.A.Komenského, s filmy, přednáškami, uměleckými večery, divadelním večerem mládeže. Informuje Aleš Berka, Vsetín 1423, ČSSR.

La redaktoro tiamaniere dankas por ĉiuj bondeziroj, kiujn pli ricevis okaze la Nova jaro de niaj legantoj.

Redaktor děkuje tímto způsobem za všechna blahopřání, která obdržel od našich čtenářů k Novému roku.

ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA kunvenas ĉiulunde de la 19a horo. La vizito de la klubo ĉiam valorigas. Krome renkonto kun niaj elstaraj samideanoj oni povas preskaŭ ĉiam renkontiĝi kun
eksterlandaj amikoj vizitantaj nian ĉefurbon. La klubo havas ĉiam preparitan artan aŭ alian amuzan vesperon. Ekzemple en marto: 2.Olga Hanke-ová: Ĉu vi konas Slovakion (kun diapozitivoj). 9. Junulera vespero. - 16.Josef Vítek: vespero kun espermantistoj el Mělník. - 23.Jarkunveno. - Kantas f-ino Hana Řípová. - 30.prof.Horský: Komenský. Kunvenejo Praha 1, Řeznická 17.

ESPERANTSKÝ KLUB V PRAZE zasedá každé pondělí od 19. hodiny. Návštěva klubu se vždy vyplácí. Kromě setkání s našimi čelnými samideán je možno téměř vždy se setkat se zahraničními
přáteli, kteří jsou na návštěvě našeho hlavního města. Klub má vždy připravený umělecký nebo jiný zábavný program. Na př. v březnu: 2.Olga Hanke-ová: Znáte Slovensko (s diapozitivy). - 9. Mládežnický večer. - 16. Josef Vítek: večer s mělnickými esperantisty. - 23. Výroční schůze. - Zpívá sl. Hana Řípová. - 30. prof. Horský: Komenský. Klubovna v Praze 1, Řeznická 17.

Forpasis subite post mallonga malsano 45jara modesta s-ano Miroslav Smotlacha el Vodňany, laŭ lingva lia mortanonco. Li estis talentita nobla homo kaj lia rememoro restas ĉiam klara.

Náhle zemřel po krátké nemoci 45letý skromný samideán Miroslav Smotlacha z Vodňan, podle dvojjazyčného jeho úmrtního oznámení. Byl to talentovaný a šlechetný člověk a jeho památka zůstane vždy čistá.

| Traduku: (almetu 3 Kčs poŝtmarkojn) | Přeložte: (přiložte 3 Kčs ve známkách) |
| --- | --- |
| Prosím o zaslání ukázkového výtisku Vašeho listu. Zajímám se obzvláště o jazykovou hlídku, která je velmi důležitá pro začátečníky. Byl bych vám velmi povděčen, kdybyste mi zaslal svůj nejnovější seznam knih. Chci si zakoupit nějakou esperantskou čítanku. Jestliže Vaše nová učebnice esperanta pro samouky již vyšla, zašlete mi ji a přiložte složenku. Která jazyková díla lze u vás koupit? Máte nějaké spisy Zamenhofovy? Rád bych si u Vás dal natisknout dopisní papíry a obálky s esperantskou hvězdou. Oznamte podmínky. | |

VF